

Christian Friedrich David Schubart,

La truto

tradukita de Ludwig Schödl

En riveret' malvarma,
 Ja en petola ag'
 Kaprica truto ĉarma
 Saltetis kiel sag'.
 Mi staris ĉe la bordo,
 Rigardis kun plezur'
 La fiŝon en akordo
 Kun rivereta pur'.

Malice kun intenco
 Ĉe l' bordo gvatis vir'
 Kun vergo, kun finenso
 La truton kun dezir'.
 Se l'akva kristaleco
 Nur restos, pensis mi,
 Al fiŝa libereco
 Atencus vane li.

Sed nun senpacience
 La fiŝkaptont' aĉigas
 Akvon li intence
 Kaj jam el ĝia ond'
 Trompitan truton tiras.
 Kaptita, ho karul',
 La koron vi disŝiras
 Amata, vi ĉarmul'!

.....
,

,

*Traduko de la Germana poemo "Die Forelle" de CHRISTIAN FRIEDRICH DAVID SCHUBART (*1739-03-24 – †1791-10-10) en Esperanton de LUDWIG SCHÖDL (*1909-10-31 – †1997-02-20).*

Arg-832-1670 (2013-02-20 09:46:20)

Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la kantlibreto „Ni kantas“, eldonita en 1980 de la Centra Laborrondo Esperanto de Kulturligo de GDR, redaktita de Ludwig Schödl. Pri la tradukinto vidu la vikepedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Schödl.